Elli Weisbach,

# Vivmaterialo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

El flikfadenoj multkoloraj buntaj kaj grizaj
ni teksas vivon. Vidu,
kiel ĝi sin kunvolvigas kaj maŝojn kaj desinojn
endevigas.

Materialo por sonĝado,
tuko por morti.
Faden-eskalo, kolor-disiĝo,
fadenbulo, disturbaĵo, nodo,
disŝiraĵo.
Ligopunktoj kaj fadenmontraj linioj,
fluado, ondoj el varpoj kaj veftoj,
varpo kaj vefto.

El flikfadenoj multkoloraj buntaj kaj grizaj
teksas ni vivon. Vidu,
kiel ĝi kunmetas kaj la bobeno surgrunde
ĝisfine saltetas.

Kio ĝi fariĝos?
Ĉu tuko el veluro kaj silko,
protektanta tegaĵo,
ĉu fajna tapiŝo, ĉu kruda sako?

El flikfadenoj multkoloraj buntaj kaj grizaj
teksas ni vivon. Vidu,
kiel ĝi pikigas kaj la randojn kaj eĝojn
alrompigas.

*Traduko de la Germana poemo "Lebensstoff" de* ELLI WEISBACH *(Elvira Köhler) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2007-03-23.*

*Arg-392-773 (2007-03-28 07:29:43)*